# KATOLIKA SENTO

72

2



U.E.C.I. ANNO 51°

SPEDIZIONE
IN ABBONAMENTO POSTALE
GRUPPO IV
BOLLETTINO MENSILE

# KATOLIKA SENTO

BOLLETTINO DELLA
**UNIONE ESPERANTISTI CATTOLICI D'ITALIA (U.E.C.I.)**

**Anno 51° - 1972**

Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (Mi)

Redattore:
P. GIACINTO JACOBITTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA

Autorizzazione Tribunale
di Milano N. 6536 del 6.4.1964

KATOLIKA SENTO

51a Jaro n° 2 Februaro '72

## LA EKLEZIO,

## GARDANTO DE LA AŬTENTIKA REVELACIO

(Parolado de la Papo dum la ĝenerala aŭdienco de la 19-a de januaro)

Provu meti vian menson, vian spiriton, eĉ vian viv konscion antaŭ la amason de la plej grandaj demandoj, tiuj kiuj rilatas la originon de la universo, la sencon de la vivo, la sopiron koni la destinon de la homaro, la religian fenomenon, kiu intencas respondi ĉi tiujn demandojn, ensorbante kaj superante kion la sci enco kaj la filozofio povas al ni diri tiurilate. Kaj pro vu loki la kristanan aferon en kaj super tiujn demandojn je senfinaj postuloj, kiujn ni nomas tenebroj, sed kiuj, kompare kun la kristana afero mem, klariĝas kaj ekvidiĝas sian misteran profundecon kaj samtempe certan novan mirindan belecon sian, kaj vi sentos eĥi en vi, kvazaŭ ili estus en ĉi-sama momento eldiritaj, la famegajn parolojn de la Evangelio de Johano: "La lumo brilas en la tenebroj". La panoramo de la kosmo lumiĝis kvazaŭ el la nokto estus leviĝinta la suno, la aĵoj montras sian ravan kaj ankoraŭ esploreblan ordon; kaj la homo preskaŭ ridante kaj tremante de ĝojo ekkonas sin mem kaj sin malkovras kiel vaganton privilegiitan, kiu iras, humila kaj supera, en la scenejo de la mondo, kun la samtempa konscio havi rajton kaj kapablon superregi ĝin kaj havi kune de

von kaj eblecon transcendi ĝin per la ĉarmo de nova rilato, kiu ĝin superstaras: la dialogo kun Dio; dialogo, kiu malfermiĝas jene: "Patro nia, kiu estas en la ĉieloj...".

Tio ne estas sonĝo, ne estas fantazio, ne estas halucino. Ĝi estas simple la efiko unua kaj normala de la Evangelio, de ĝia lumo sur la ekranon de animo, kiu malfermiĝis je ĝiaj radioj. Kiel nomiĝas ĉi tiu projekcio de lumo? Ĝi nomiĝas la Revelacio. Kaj kiel nomiĝas ĉi tiu malfermiĝo de la animo? Ĝi nomiĝas la kredo.

Mirigaj veroj, kiujn ni ĉerpas el tiu sublima libro de teologio kaj de mistiko, kiu nomiĝas la katekismo, tio estas la religia libro de la fundamentaj veroj. Sed ĉi tiu antaŭparolo hodiaŭ volas interesi tiujn, kiuj nin aŭskultas, al posta demando, kiun ni opinias je granda graveco kompare kun la ideologia kondiĉo, en kiu hodiaŭ troviĝas la homo religie pensante; tio estas : ĉu la kontakto kun Dio, rezultanta el la Evangelio, estas etapo en la natura evoluo de la homa spirito, evoluo, kiu ankoraŭ pludaŭras, sin ŝanĝante kaj sin superante, aŭ ĝi estas momento unika kaj definitiva, el kiu ni devas nutri nin senfine, sed ĉiam rekonante neŝanĝebla ĝian esencan enhavon? La respondo estas klara: tiu momento estas unika kaj definitiva. La Revelacio estas fiksita en la tempo, en la historio, je preciza dato, je determinita okazaĵo, kiun, kun la morto de la Apostoloj, oni devas konsideri finita kaj por ni kompleta. La Revelacio estas fakto, kaj samtempe mistero, kiu ne naskiĝas el la homa spirito, sed venis el dia iniciato, kiu havis multajn progresivajn manifestiĝojn, dum longa historio, la antikva Testamento; kaj kulminis en Jesuo Kristo. La Parolo de Dio estas tiel fine por ni la Vorto Enkarniĝinta, la Kristo historia kaj poste vivanta en la komunumo al Li

kunligita pere de la kredo kaj de la Sankta Spirito,en la Eklezio, nome Lia mistika Korpo.

Per tiaj asertoj, tre karaj filoj, nia doktrino disiĝas el eraroj, kiuj cirkulis kaj ankoraŭ montriĝas en la kulturo de nia tempo, kaj povus tute ruinigi nian kristanan koncepton pri la vivo kaj pri la historio. La modernismo reprezentis la karakterizan esprimon de ĉi tiuj eraroj kaj sub aliaj nomoj ĝi estas ankoraŭ aktuala. Ni povas tial kompreni, kiel la katolika Eklezio, hieraŭ kaj hodiaŭ, donas tiom da graveco al la rigora konservado de la Revelacio aŭtentika,kaj konsideras ĝin kiel trezoron netuŝeblan, kaj havas konscion tiel severan pri sia fundamenta devo defendi kaj transdoni en vortoj nemiskompreneblaj la doktrinon de la kredo; la ortokokseco estas ĝia unua zorgemo;la paŝtista tasko estas ĝia fundamenta kaj providenca funkcio: la apostola instruo fiksas, fakte, la kanonojn de ĝia predikado; kaj la instrukcio de Apostolo Paŭlo, "Depositum custodi" konsistigas por ĝi tian devontigon, ke estus perfido ĝin malobservi. La Eklezio ne inventas sian doktrinon: ĝi estas ĝia atestanto, gardanto, interpretanto, peranto: kaj koncerne la verojn proprajn de la kristana mesaĝo, ĝi estas ties malcedema konservanto. Kaj al tiu, kiu petas igi la kredon pli facila, pli konforma al la gustoj de la ŝanĝiĝema pensmaniero de la tempoj, ĝi respondas kun la Apostoloj: "Non possumus", ni ne povas.

Ĉi tiu tro mallonga leciono ne estas ĉi tie finita,ĉar oni devus mencii, kiel ĉi tiu origina Revelacio transdoniĝas tra la parolo, la studo, la interpretado, la aplikado: tio estas, kiel ĝi generas tradicion, kiun la aŭtoritato de la Eklezio akceptas kaj kontrolas, iufoje kun neerarema decido. Oni devos ankaŭ memorigi , kiel la scio pri la kredo kaj la instruo, kiu ĝin konigas, nome la teologio, povas esprimiĝi en pluraj ma-

nieroj. La "plurismo" teologia estas legitima, kiam ĝi enteniĝas en la kampo de la kredo kaj de la misio konfidita de Kristo al la Apostoloj kaj al iliaj posteuloj.

Oni devos ankoraŭ ekspliki, ke la Parolo de Dio, gardata en sia aŭtentikeco, estas nek senfrukta nek sterila, sed, male, fekunda kaj viva, kaj destinita por esti ne nur pasive aŭskultata, sed travivata, ĉiam renovigata, kaj ankaŭ enkarnigata en la unuopaj animoj, en la unuopaj komunumoj, en la unuopaj Eklezioj, laŭ la homaj dotoj kaj la karismoj de la Sankta Spirito, je kiuj disponas ĉiu, kiu fariĝas fidela disĉiplo de la Parolo viva kaj penetranta de Dio.

Eble, se Dio volos, ni ree parolos pri tio. Sed nun sufiĉu ĉi tiuj fragmentoj de katolika doktrino por igi vin pensemaj, fervoraj kaj feliĉaj.

## SANKTA PIO 10-a KAJ ESPERANTO

(de Luigi Minnaja)

La katolikoj interesiĝis pri Esperanto tuj post ĝia apero. La litova prelato Aleksandro Dombrovski - la estonta esperantista poeto - alproksimiĝis al la lingvo internacia de Doktoro Esperanto jam en 1887-a, kaj kun juna entuziasmo kontaktiĝis kun la aŭtoro, kaj fariĝis fervora propagandisto.

Sinjoroj de Beaufront (aŭtoro de la unua katolika preĝareto en Esperanto, eldonita en 1893-a), Michaux, Peltier, Giambene, Bianchini, Meazzini kaj multaj aliaj katolikoj senlace laboris por progresigo de la paciga lingvo, kaj tio okazis en la ĝenerala kadro de la movado. En la jaro 1903-a, laŭ iniciato de Pastro Peltier, ekburĝonis kun sia aparta celo la katolika movado, kaj la unua numero de "Espero katolika", aperinta en oktobro 1903-a, malfermiĝis per la jena poemeto (ĉu profetaĵo?) de prelato Dombrovski:

## AL LIA PLEJ SANKTA MOŜTO PAPO PIO 10-a

Ĉesis jam viva malgajo publika,
Dio ĝojigis la Kristeklezion:
Sur trono Petra la mond' katolika
Salutas Pion.

Grincu per dentoj infera serpento!
Nin ne timigas jam via envio:
Tra l' maraj ondoj kaj forta la vento
Nin gvidos Pio!...

Oni diradu, ke Petra la Ŝtono
Jam detruiĝas, fariĝas nenio...
Granda mensogo! Jen sankta la trono
Kaj sur ĝi Pio!...

Tial laboru sen tim' kristanaro
Ĝis kiam estos, laŭ vorto de Dio:
Unu paŝtisto kaj unu ŝafaro...
Gvidu ĝin Pio!...

La 29-an de majo 1954-a okazis en Romo io eksterordinara: en la senkompara scenejo de placo S.ta Petro - ĉar ne estis sufiĉe vasta la baziliko por enteni la popolamason el pilgrimantoj - Papo Pio 12-a proklamas per la solena formulo la sanktuligon de Papo Pio 10-a, kaj tuj poste eldiras paroladon, per kiu antaŭ ĉio li reliefigas la eksterordinarecon de la fakto, ke unuafoje en la historio de la Eklezio la Sanktuligo de Papo estas proklamata de tiu, kiu havis la privilegion deĵori je lia servo en la Vatikano.

La postan tagon posttagmeze la vitra ĉerko kun la korpo de Sankta Pio 10-a estis transportita en la bazilikon de S.ta Maria la Granda, kie ĝi restis unu semajnon, kaj estis celo de senfina kolono da piuloj, ki-

uj deziris tuŝi ĝin per objektoj, por poste konservi ilin kiel relikvojn. Nun ĝi estas denove en la baziliko de S.ta Petro, kaj antaŭ ĝi haltas surgenue en silenta fervora preĝo la sinsekvaj vizitantoj.

La nomo de Pio 10-a por la esperantistoj ĝuas tute specialan estimon, kaj lia sanktuligo estas motivo de intima ĝojo. Li estis la unua Papo, kiu efektive interesiĝis favore al nia afero. Prezentis al li Esperanton monsinjoro Luigi Giambene (mortinta en 1944-a), kiu pro sia ofico tiam frekventis la Vatikanon, kaj plurfoje havis okazon paroli kun la Papo pri la internacia lingvo. De tiam Pio 10-a, ĉiam simpatia kaj tre afabla, kiam de tempo al tempo Li vidis prelaton Giambene, ŝerce direktiĝis al li per la alnomo "Monsinjoro Esperanto".

Estas memorindaj pluraj aŭdiencoj donitaj al esperantistoj, dum kiuj Lia Papa Moŝto esprimis sian favoron. Jen tio, kion skribis monsinjoro Giambene al la redaktoro de "Esperanto katolika" pri la unua oficiala Papa interesiĝo la 2-an de junio 1906-a:

> "La Sankta Patro min tre afable akceptis hodiaŭ matene. Mi transdonis al Li vian laboraĵon. Li legis laŭte (sed, kompreneble, malko - rekte) la poemon de pastro Dombrovski, dirante ĉe ĉiu verso: 'Mi komprenas'. Mi prezentis la Esperante skribitan peton de beno por vi kaj la redaktoroj de 'Espero Katolika'. Ankaŭ ĝin Li legis laŭte kaj poste diris: 'Mi sendos al vi skribaĵon pri tio'...'."

Kaj la skribaĵo alvenis al la katolika esperantistaro dum la dua Universala Kongreso en Ĝenevo, kaj tekstas jene:


> "El la Vatikano, la 27-an de junio 1906-a
> "Via tre respektinda Monsinjora Moŝto,
> mi ricevis la honoran komision sciigi al vi, ke

la Sankta Patro favoranime kaj kun speciala plaĉo bonvolis akcepti la aperintajn numerojn de l' revuo 'Espero katolika', kiujn vi humile prezentis al li je la nomo de pastro Emilio Peltier. Bonvolu Via tre respektinda Moŝto komunigi al la nomita Pastro la Papan plaĉon kaj komuniki la Apostolan Benon, kiun Lia Sankta Moŝto donis al li kaj al la redaktoroj de l' Revuo. Plenuminte la ricevitajn ordonojn, kun la sentoj de grandega estimo mi diras min
tre sindonema servanto - Giovanni Bressan."

La granda novaĵo rapide disvastiĝis inter la kongresanoj. Franca traduko de la letero estis sendita al ĉiuj ĵurnaloj ĝenevaj, kaj ĉiuj ĝin publikigis. Laŭ deziro de multaj kongresanoj, la prezidanto de la Kongreso, pastoro Schneebergen, protestanto, legis la leteron al la kunvenintoj, kiuj salutis ĝin per unuanimaj longaj aplaŭdoj. S-ano Karlo Bourlet, kvankam liberpensulo, deklaris, ke tiu fakto estas tre grava por la progresado de Esperanto kaj tial li tre plezure ĝin aplaŭdas, kaj esprimas la deziron, ke la membroj de aliaj religioj aŭ filozofioj same klopodu, por ricevi similan aprobon de la estroj, por montri, ke Esperanto estas vere neŭtrala lingvo, kiu povas kaj devas utili al ĉiuj partioj kaj ideoj.

Specialan gravecon havas la aŭdienco donita de Pio 10-a la 4-an de aprilo 1909-a al Frato Izidoro, la poeto, kiu tradukis al Esperanto multajn katolikajn popularajn himnojn. Dum ĝi la Sankta Patro, esprimínte sian ĝojon pro la propono enkonduki Esperanton en la Blindulejojn, akceptita fare de la Blindula Kongreso okazinta en Napolo kelkajn tagojn antaŭe, diris la profetan frazon: "Esperanto havas antaŭ si grandan estontecon".

Ankaŭ en aliaj okazoj la bona, simpla kaj afabla Papo esprimis sian grandan simpatian favoron por la paciga internacia Lingvo per trafaj frazoj, inter kiuj: "Mi vidas en Esperanto valoran rimedon por atingi la unuecon inter la katolikoj de la tuta mondo".



La 30-an de marto 1910-a, ĉe la malfermo de la 1-a Kongreso Internacia de la Katolikaj Esperantistoj en Parizo, la prezidanto anoncis, ke la Komitato ricevis de Monsinjoro Giambene tre kuraĝigan leteron, kiu diras: "La Sankta Patro en speciala aŭdienco bonvolis ekzameni la diversajn temojn de la kongresa programo, kaj ne nur plene aprobis ilin, sed krome donis plenan indulgencon al ĉiuj gekongresanoj".

La morto de Pio 10-a en la jaro 1914-a konsistigis tre doloran perdon por la esperantistaro; sed la levado per beatigo al la honoroj de la altaroj, farita de Papo Pio 12-a en la Placo S.ta Petro la 3-an de junio 1951-a vespere, plenigis la koron de la esperantistoj, precipe de la katolikaj, de grandega intima ĝojo. Revo silente tiom sopirata fariĝis realaĵo, kaj dum la 23-a Internacia Kongreso de la Katolikaj Esperantistoj, okazinta en Munkeno (Germanujo) je la komenco de aŭgusto de la sama jaro, la Beata Pio 10-a es-

tis elektita ĉiela protektanto de la Katolikaj Esperantistoj.

Kaj nova motivo de ĝojo estis por la adeptoj de la paciga lingvo la sanktuligo de ilia ĉiela protektanto, proklamita, kiel mi jam diris, la 29-an de majo 1954-a vespere, en la sama superba sugestia scenejo de placo S.ta Petro.

La kulto al la nova Sanktulo disvastiĝas pli kaj pli inter la esperantistoj de la tuta mondo kaj naskas simpatiajn iniciatojn. Inter ĉi tiuj prezentis specialan reliefon la propono de Lia Kardinala Moŝto Lercaro, episkopo de Bolonjo (Italujo), kiu, en letero de la 15-a de aŭgusto 1954-a, sendante koran saluton kaj benon al la italaj esperantistoj kongresantaj en Sassari, aldonis:

> "Mi akceptas kun favoro kaj lanĉas kun entuziasmo la proponon, ke la katolikaj esperantistoj de la tuta mondo fariĝu iniciatantoj por la starigo de Templo al sia Protektanto, la Sankta Pontifiko Pio 10-a: Templo, kiun mi permesas al mi proponi starigi en ĉi tiu mia Bolonjo, kiu, tre antikva centro de kulturo por la tuta mondo, sentas en la gastamaj tradicioj la noblan taskon alproksimigi inter ili la gentojn."

Kaj la propono de Kardinalo Lercaro fariĝis realaĵo la postan jaron. La 2-an de aŭgusto 1955-a katolikaj esperantistoj de la tuta mondo, kunvenintaj en Bolonjo por la 40-a Universala Kongreso de Esperanto, inaŭguris preĝejon dediĉitan al S.ta Pio 10-a, en kiu la jena marmorskribaĵo memorigas la eventon:

✝

Kiel de modesta sia sankta hejmo
JOZEFO SARTO
foririnta humila pastro
riĉa nur je dia favoro
atingis superegan universalan patrecon
sin nomigante Pio X
tiel de tiu ĉi modesta preĝejeto
al li Sanktulo dediĉita
foriru Lia dua beno al tuta mondo
per Esperanto
kiun li antaŭdiris
plej forta ligilo universala
inter katolika filaro
kaj por ama interkompreno de la homaro

☆

2 - 8 - 1955

Dum la 40-a Jubilea Universala Kongreso de Esperanto

Kunveno de la "UNUIĜO KATOLIKAJ ITALAJ ESPERANTISTOJ" (UECI)

okazos ĉijare en Bolonjo okaze de la 60a datreveno de la Bolonja Grupo, en la tagoj 29a-30a de aprilo 1972.

Ĝenerala programo:

| | | |
|---|---|---|
| Sabate | 29/4: | Interkona vespero. |
| Dimanĉe | 30/4: | Matene: S.Meso; Memorigo de la datreveno. |
| | | 13a h. Komuna manĝado. |
| | | Posttagmeze: 15.30 h. UECI- kunveno; Pilgrimado al la urba tombe |

jo por florkrona depono sur la tombon de P. Carolfi.
Vespermanĝo. Kultura kaj distra kunveno.

Lunde 1/5: Ekskurso al la Termoj de Bacelasco. (Oni donos akurate pli detalajn informojn pri la programo).

ESPERO KATOLIKA aperis kun sia novjara alloga aspekto. La enhavo estas varia kaj ankaŭ la presado sin prezentas bone. Ĝia abonkotizo kostas 2.000 lirojn Ni deziras al ĝi multajn abonantojn, kiuj apogu fervore la IKUE-asocion.

## ROMA ESPERANTA VOĈO nº102

EN FEBRUARO la horo de la sankta meso en Esperanto, laŭ deziro de kelkaj partoprenantoj, estos eksperimente je la 11,15 anstataŭ je la 10,30.

ALIĜIS AL UECI-REV por 1972: Romo: O. Sias. R. Clerici; V. Musella; N. Giuliani; M. G. Bizzoca; M. Tomassini; L. Macak; C. Cimino; C. Argentati; A. Scalia; R. Corsetti; C. Cecchitelli; G. De Carolis; C. Canu; G. Bonardi; F. Fresco; Aosta; A. Cuaz; L. Deffeyes; A. Falcoz; Bolonjo: T. Casagrande; G. Billi, Gamberini; G. Galletti; Brescia: E. Bordogna. A. B. Marinaro; Busto Arsizio (VA): E. Violi; Cagliari: V. Corrias; Carrara; F. Poli; Catania: G. Zappulla; Cesena: (FO): T. Girotti; Cividate al Piano (BG): F. Belleboro; Fossalunga (TV): F. Casonato; Genova: A.

Schmukler; F.Rebora; R.Rizzo; MEL; Mantova; D. Zacché Portioli; Milano: L.Ferrari; V.Dall'Acqua; C.C.Ferrari; C.Valvassori; P.D.Mondoví(CN): F. Orlandini; Napoli; A.Jacobitti; Novara: G. Pisoni; Rimini(FO): A.Ciccanti; M.L.Ricciotti; D.Magnani; A.Gambuti; Sarezzo(AL): G.Barbieri; Ternengo(VC) L.Garcia; Udine: Gr.Esp.; P.Trevisani; Venezia; G.Rosada; Vercelli: M.Sola; Verona: F.Galbusera A.Vallotto; L.Terrazzani; Vicenza: G.Stocchiero; I. Stocchiero; C.Ferrauto; Aŭstrujo: J.Nagy; Belgujo: A.Decorte; Britujo: A.Sawicz; Ĉeĥoslovakio: J.M. Vecerovà; I.Sedlak; V.Janitor; M.Olos; F.Polster J.Urban; J.Stocklasovà; J.Karhan; B.Suchanek; K. Hodik; Kalina R; B.Malcova; M.Svacek; M. Svab; L.Pencovà; Cuba: P.Lamas Diaz; Francujo: E. Philippe; Germanujo: J.König; A.Wollbacher; Hungarujo J.Szenthelwi Molnar; H.Tasnadi; Jugoslavio; R. Patafta; Nederlando: J.T.Fischer; D.H. Pollando: Z. Bodecki; W.Mazur; H.Cura; L.Kosieniak; V.Kryczkowski; B.Pytlewicz. Entute: 255.

BONFARA KASO: 10.000 V.Karulova; 4.000 F.Galbusera; A.Signore; 2.000 O.Sias; A.Guidi; 1.400 S.F.Messina; Entute; 62.400

S-ano MILOSLAV SVACEK informas:
"Interesuloj, kiuj volas julie libertempi inter ĉehaj esperantistoj, petu informojn ĉe: s-ro Miloslav Svaĉek, Penĉice 16, okres Prerov, Ĉeĥoslovakio.

> Ĉi tiu estas la lasta numero, kiun ni sendas al neabonintoj.

KVANKAM ĈIUJ KOSTOJ ALTIĜIS ni ne volis altigi la aliĝkotizon de K.S., kiu restas ankoraŭ: £.1.000

Ni esperas, ke tiel ĉiuj, kiuj abonis nian revuon en la pasintaj jaroj, renovigos tuj sian abonon; ĉar ni devos nepre haltigi la sendadon al ne-pagintoj.

PASTROJ, KIUJ INTENCAS aliĝi, povas celebri unu meson intence de p. Jacobitti, nur avertante lin pri tio. Aliaj personoj, kiuj preferas tiun aliĝmanieron, povas peti la samon de katolika pastro - kiel supre dirite - sed estas petataj sendi al p. Jacobitti konfirmon, se eble, pri la celebr(i/o)ta meso, subskribitan de la pastro. Tiuj, kiuj eĉ ne tiamaniere povas fari, kaj tamen ŝatas la bultenon, petu de p. Jacobitti senpagan sendadon.

---

El la Katolika Eklezio:

---

JARO RIĈA JE EKLEZIAJ agadoj estis la 1971a. Sendube la plej grava el ili estis la roma sinodo, kiu fokusigis la historian momenton de la eklezio, kaj karakterizis la tutan jaron. La du sinodaj temoj por si mem estis disvolvado de la agadlinioj indikitaj de la Dua Vatikana Koncilo. La rezultatoj, kiujn ili donis, atestas la renoviĝon de la eklezio, kiu jam startis, kvankam inter multaj obstakloj: interne pro la rezistoj, kiuj bremsas la kuron, aŭ pro nekontroleblaj antaŭenfuĝoj; ekstere pro la kontrasto kun mondo pli kaj pli sekularigita kaj agnostika al la diaj leĝoj, kaj surda al la alvokoj de justeco kaj paco inter subevoluintaj kaj premitaj popoloj. La papo per solenaj instruoj kaj per familiaraj paroladoj klopodis daŭre gvidi la konsciencojn laŭ la direktivoj de la eklezioj, pri la rilatoj inter la "institucia" kaj la "karisma" eklezio; pri la kon

cepto de kristana komuneco; pri aŭtoritato kaj la esprimmanieroj de ĝia servado; pri la tasko de la sacerdoto en la hodiaŭa mondo; pri la loko de la laiko en la eklezio kaj pri lia vokiĝo al apostolado, pri la rolo de la junularo, kondiĉe ke ĝi ne estu nur senfrukta kaj detruema kontestado, rolo decidiga en la pretigo de pli justa kaj humana socia konstruado; pri la evangelia atesto, kiun la religia vivo donas al la eklezio kaj ankaŭ al la profana socio: atesto, kiun Paŭlo VI intencis publike reliefigi kaj proponi kiel ekzemplon, solene beatigante patron Maksimilianon Kolbe kaj transdonante la porpacan premion "Johano XXIII" al fratino Maria Teresa, humila relîĝiulino, kiu sin dediĉis al asisto de malriĉuloj kaj lepruloj en Hindujo. Tiu ĝenerala revizio de vivo konkretiĝis per serio da gravaj decidoj kaj iniciatoj. En la liturgia reformo, per la nova rito de la konfirmacio, la normoj pri la sacerdota preĝo kaj la "Horliturgio". En la religia renovigo, per la apostola letero "Evangelia atesto". En la nova impulso por la formado de la kristana popolo, per la publikigo de la "ĝenerala katekisma direktivaro". Sekvis la reordigo de la "biblia komisiono"; la plirapidigo de proceduroj ĉe la kongregacio por kredodoktrino kaj de la edziĝaj procesoj; la institucio de la konsilio "Cor unum" por la kunordigo de ĉiuj energioj kaj entreprenoj de organizoj kun karitataj kaj asistaj celoj. La paŝtista instruo "Komuneco kaj progreso", kiu montris tute apartan zorgon de la eklezio pri sociaj komunikiloj; kaj la apostola letero "okto gesima adveniens", kiu estas nova antaŭenpaŝo en la eklezia doktrino pri sociaj problemoj. La dialogo kun ĉiuj bonvolaj homoj enprofundiĝis, precipe en la ekumena sfero, eĉ inter ne kredantoj: almenaŭ pri la temoj de paco kaj justeco. Pri justeco, protekto de la sendefenda homaro leviĝis plurfoje la voĉo de la papo

okaze de procesoj en Burgos, Leningrado kaj Konakry, por la palestinaj rifuĝintoj kaj ofte por la pakistanaj. Forta kaj daŭra morala premo sur registarojn kaj respondeculojn por inviti ilin al decida revizio de tiuj politikaj, ekonomiaj kaj sociaj sistemoj, kiuj estas la fontoj de maljustecoj kaj konfliktoj. Temo, funde, de la "Tago por la Paco": "Se vi volas pacon, klopodu por justeco", kiu altiris riveron da konsentoj el la tuta mondo, el ŝtatestroj kaj registaroj, el ĉefoj de kristanaj kaj de ne kristanaj religioj, el religiaj kaj politikaj aŭtoritatoj. La papa agado elvolviĝis, dum la jaro per personaj kontaktoj kun marŝalo Tito, (la unua ŝtatestro de la orienta Eŭropo, kiu havis oficialan viziton al Vatikano); kun la prezidentoj de Niĝerio, Finlando, Panamo kaj Aŭstrujo; kun la ministro por ekst. af. de Sudano kaj de Hungarujo, kies vizito preparis la eliron de kard. Mindszenty. Per diplomataj agadoj la papo volis montri la fervoran eklezian konsenton en la traktato pri malpermeso de nukleaj armilpretigadoj; kaj tio donis eblecon al mons. Casaroli iri al Moskvo por transdoni la dokumenton de la konsento; por oftaj intervenoj favore al la paco en la Norda Irlando, en la konflikto inter Hindujo kaj Pakistano, por la solvo de la mezorienta konflikto kaj por la ĉesigo de milito en Vietnamo.

UNUIĜO INTER KRISTANOJ devas efektiviĝi pluirante: la plej grava danĝero por ekumenismo hodiaŭ estus fariĝi nura institucio, kiel multaj aliaj, kristaliĝi. En la 1971a oni multon faris, laŭ diversaj niveloj por eviti tiun "blokiĝon". Ĉe Adisabebo en januaro, ĉe Lovanjo en aŭgusto la centra komitato de CEC (Ekumena Konsilio de la Eklezioj) kaj konferenco "Kredo kaj Konstitucio" (unu el la organizoj de la sama CEC) insistis daŭre en la propono de universala Koncilo por la efek

tiva unuigo de ĉiuj kristanoj. Tiu Koncilo, kies unua propono okazis unuafoje en Upsalo la 1968-an, postulos multajn jarojn por sia pretigado; sed la fakto, ke la projekto estas konsiderata kiel normala ĉe la plej granda parto de la 252 kristanaj eklezioj membroj de CEC, estas per si mem jam eksterordinaraĵo. Pri tiu propono la katolika eklezio ankoraŭ ne decidis; sed oni rajtas opinii, ke ĝi ne opozicius altio, se realiĝos kelkaj kondiĉoj. Efektive kelkaj gravaj celoj estas ankoraŭ atingendaj. Ankaŭ la ortodoksaj eklezioj preparas sian Koncilon. Nombro da komisionoj intereklezioj realigadas apartajn akordojn pri teologio aŭ disciplino. Inter ĉi tiuj estas la celoj atingitaj la 7an de septembro inter la anglikana kaj la katolika eklezio, post longa kaj silenta laboro, kiel ni jam raportis. Oni devas ankaŭ rimarki, kiel providencan signon de nia epoko, la aperon de novaj valoraj ekumenistoj, kiuj gvidis la diversajn ekleziojn en 1971a: patriarko Pimen en Moskvo; la kopta patriarko de Egiptujo, mond. Chenouda; patriarko Teofilo de Etiopio. Ni memorigas ankaŭ la konstantan aktivecon de patriarko Atenagoro, kiu malgraŭ sia maljunaĝo neniun favoran okazon preterlasas insisti, en siaj oftaj mesaĝoj, pri la urĝo de unueco. La roma porunueca Sekretariato kontaktas siaflanke kun ĉiuj kristanaj konfesioj. Ĝiaj membroj estas "grandaj vojaĝantoj". Kard. Willebrands iris al Ateno, al Moskvo, al Denver (ĉe metodistoj), al Kairo. Ne ekzistas kristana manifestado, en kiu la katolikoj ne ĉeestas kiel partoprenantoj, aŭ almenaŭ kiel observantoj. La problemo de la eniro de la katolika eklezio en la ekumenan konsilion de la eklezioj, estas ankoraŭ ne solvita; sed sendube ankaŭ ĝi solviĝos, ĉar la centra komitato de CEC komencis pristudi, en Adisabebo novan tipon de reprezentado por la eklezioj membroj. Ĉi

tiuj agadas aktive por la solvo de problemoj kiel tiu de justeco en la mondo. Tipa ekzemplo estas, ekster ĉiuj politikaj implikoj, la financa subteno, kiun CEC donas al 17 organizoj de "rasaj grupoj premitaj, aktive luktantaj kontraŭ la blankula rasismo" kaj al 7 organizoj, kiuj "helpas la viktimojn de la rasisma maljusteco". - La projekto de la koncilo, lanĉita de Taizé, daŭre agadas ĉe junuloj kiel fermento. La elekto de frat' Max kiel porparolanto de Roger Schultz ĉe la Sankta Sidejo, estas ankaŭ indico de la originala sinteno de Taizé rilate al ekumenismo. Kaj oni ne devas subtaksi ankaŭ la remalkovradon de Kristo, faritan ĉefe de junuloj ekster la eklezio, precipe en Usono. Tiu celo, kvankam montras ilian sinceran deziron retrovi la ĝustan vojon, kiel rimarkis la papo, riskas multobligi la disiĝojn kaj endanĝerigi la klopodojn por ekumenismo. Hodiaŭ grava tasko de ĉiu kristano estas la gardo de la tuta kredo. La luterana teologo Oscar Cullmann, parolante novembre de 1971-a al grupo de katolikaj intelektuloj bonege diris: " La aktuala krizo de la kredo ne devas trompe altiri nin al supraĵa ekumenismo, en kiu ĉiuj diverskonfesiaj kristanoj renkontiĝas ĉe kritika bazo pure negativa kontraŭ la eklezio, kaj des pli malbone, ĉe bazo de kapitulacio antaŭ la mondo. Tiamaniere la ekumenismo mem riskas esti forradikita de la kredo. Kontraŭ la danĝero, kiu minacas la kristanan kredon, mi proponas, ke ĉiuj kristanoj, zorgantaj por la aktuala situacio, kuniĝu, por meti la apartajn karismojn de ĉiu eklezio je servo de la komuna defendo de l'evangelio."

LA PORUNUIGA SEMAJNO, kiu petis de ĉiu kristano pli intensajn preĝojn por la rekuniĝo de la kristanaro, donis plian favoran okazon al patriarko Atenagoro por mesaĝo al la papo, kiu komenciĝas per ĉi tiuj vortoj :

"Nedisigeble kunigite kun via tre amata Sankteco, ni ...". "Nedisigeble". Per ĉi tiu vorto li esprimas sian koron kaj la miraklon faritan en li de la S.Spirito: "Nekredeble estas,kielmi sentas min kunigita kun la papo. Tio estas mistero por mi mem" - li iam diris. Pri patriarko Atenagoro oni multe skribas en la tutmonda gazetaro. Olivier Clement skribis ankaŭ libron: "Dialogoj kun patriarko Atenagoro". Ĵurnalistino Klara Lubich multfoje vizitis lin por lin informi pri ekumenaj kontaktoj kun alikonfesioj. Li deklaris al ŝi: "Granda ŝanco estas interkono. Ni vivis izolitaj, sen fratoj, sen fratinoj, dum jarcentoj,kiel orfoj! La unuaj dek jarcentoj de la kristanismo estis por la eklezio taŭgaj por difino de dogmoj kaj por interna organizado. Dum la dek postaj jarcentoj okazis skismoj kaj disiĝoj. Lia tria epoko, ĉi tiu, estas epoko de l'amo". Du monatojn post la historia renkontiĝo de Paŭlo VI al Atenagoro en Istambulo, la 25-an de junio 1967a, li konfesis, ke li estas ankoraŭ surprizita kaj emociita. Li nomis tiun tagon "la tagon". Li rakontis: "La tuta urbo estis funde skuita ... Li venis ĉi tien, kaj mi diris al li: "Kiel granda estas via animo, kiel riĉa via koro! Vi estas la profeto,kiu antaŭvidas kaj pretigas la estontecon". "Mi ne plu vokas ek de nun la du ekleziojn: katolika kaj ortodoksa, sed Okcidenta eklezio, Orienta eklezio". La unua renkontiĝo kun la papo okazis en Jerusalemo, la 5an de januaro 1964a; la dua en Istambulo, la tria en Romo, la 26an de oktobro 1967a. "Ĉi tiuj renkontiĝoj - li diris - estas la glora signo de la triumfo de l' amo de Kristo kaj de la grandeco de la papo, kaj indikis al ni kun kredo kaj espero, la vojon por la efektivigo de la celo de Kristo, ke ni renkontiĝu denove en la saman kalikon de lia sango kaj de lia korpo. Nihavas la saman Sinjoron, la saman patrinon Marian, la sa-

man kalikon, la saman eklezion, la saman vivon ĉi tie kaj en la eterno. Jen la himnoj de la kristnaskaj anĝeloj, kiujn ni kantas kune en Okcidento kaj Oriento. Jen la plej supera teologio! Se kelkaj teologiaj diversecoj ankoraŭ ekzistas, la suno de l'amo malintensigis ilin, kaj permesas al ni marŝi renkonte al la plena vido, al la antikva kredo, per kiu ni apartenas al la sama religio de Kristo". Skribante leteron al membroj de la "Movado de la Fajrejoj", kiujn li amas ĝuste pro ilia fervora ekumena sento, li diris: "Kristanoj de Oriento kaj de Okcidento, ni estas vokataj hodiaŭ kulturi, ĝuste ni, la unuj kun la aliaj, inter niaj amikoj, inter konatoj kaj nekonatoj, ĉi tiun dolĉan konscion, ke ni devas aparteni al la sama eklezio kiel eble plej frue! Lumbrila aŭroro de nova kristana printempo, de jarcentoj atendita, ekaperas. Tiu sunoplena tago devis veni, jam ĝi venas!" En alia okazo li diris al Lubich: "Mi estas kun la roma papo pri ĉio, kion li diras, pri ĉio kion li decidas. Li havas sur siaj ŝultroj la dudek jarcentan tradicion kaj historion. Kiel li povus sin de ŝultrigi pri dudek jarcentoj?" Pri la renkontiĝoj de la papo kun ĉiutendencaj ŝtatestroj, li diris: "Jen alia triumfo! Ĉiuj vojoj kondukas al Romo. Mi vokis lin "Pontifex Maximus". Nur li estas tia, ĉar estas li, kiu konstruas pontojn inter eklezion kaj naciojn". Kaj ankoraŭ: "La skismo okazis en la 1054a ne pro diverŝaj doktrinoj, sed ĉar ni ĉesis ami inter ni. Sed nun ni amas. La Papo, kiam estis en Hongkongo, lanĉis nur unu vorton: Amo. Dank' al Dio, dank' al Kristo Jesuo, dank' al la Sankta Virgulino ni vivas en ĉi tiu epoko. Antaŭ dek jaroj ni ne pensus, ke ni travivos ĉi tiujn horojn!".

LA EKLEZIAJ TERITORIOJ kun rezidenca sidejo en la katolika eklezio estas 2.189: kompare al 1971a ili

kreskis je 21 pliaj unuoj. Tio estas unu el la statistikaj indikoj de la nova papa jarlibro. Kiel estas sciite, tiu jarlibro respegulas la tutan strukturon de la katolika eklezio, en ĝia hierarkio kaj en ĝiaj administraj kaj apostolaj organoj. El la rezidencoj, 11 estas patriarkejoj, 401 metropolaj sidejoj, dum la ĉefepiskopaj estas 62 kaj la episkopaj 1.775. Estas krome menciindaj 1.959 titolaj sidejoj (tri pliaj ol en la '71a) : 102 prelaturoj; 22 abatejoj "nullius", 10 apostolaj administrejoj, 25 ekzarkejoj kaj episkopejoj; 84 apostolaj vikariejoj kaj 26 armeaj vikariejoj. Fine la papa jarlibro donas la liston de la episkopaj konferencoj, kiuj estas 93, kaj de la patriarkaj sinodoj, de la asembleoj kaj konferencoj orientritaj, kiuj estas 11.

OKAZE DE KUNVENO en Grottaferrata de pli ol 50 ĝeneralaj superuloj de religioj por la studo kaj apliko de la sinodaj dokumentoj kaj por la disponebleco de la religiularo en kunlaboro kun la eklezio, la papo mem sendis siajn direktivojn. "Tradicio de la religiularo, diris la papo, estis ĉiama fideleco al la eklezio eĉ en la plej malfacilaj tempoj, zorgo por la integreco de la kredo, evangelizado kaj helpo al la kristana popolo por la praktiko de la religio, kontribuo ankaŭ al la fizika bonfarto kaj al la instruado, precipe de malriĉuloj, asketeco kaj spirita levigo de animoj. La religiaj ordenoj, aldonis la papo, laboris ĉiam por frateco, justeco, kaj paco". La laboroj de la kunvenintoj, membroj de la Asocio de Ĝeneralaj Superuloj, al kiu apartenas 220 estroj de ordenoj kaj de religiaj kongregacioj, reprezentantaj 320 mil religiulojn, estis malfermita de patro Roberto Tucci, direktoro de "Civiltà Cattolica" per parolado pri la Sinodo, kaj de p. Jozefo Lecuyer, superulo de la Kongregacio de la Sankta Spirito, pri sacerdoteco.

LA 13-an DE FEBRUARO estos konsekritaj en la Vatikana Baziliko de la Papo mem, kiel ĉefepiskopoj, 4 sekretarioj de la roma kurio kaj la prezidanto de la pontifika komisiono por la sociaj komunikiloj, p. Edoardo Heston. La aliaj estas: mons. Giuseppe Casoria, sekr. de la kongregacio por la disciplino de la sakramentoj; p. Agostino Mayer, sekr. de la kongr. por reliĝiuloj kaj sekularaj institutoj, kaj p. Annibale Bugnini, sekr. de la kongr. por la dia kulto. La katolikaj esperantistoj ĝojis aparte pro la alta promocio de Mons. Bugnini, kiu efike helpis siatempe por la agnosko de Esperanto, kiel lingvo uzebla en la liturgio de la katolika eklezio.

EN ETIOPIO VIVAS 133.000 katolikoj. Kvankam malmultnombra en lando de 25 milionoj da loĝantoj, kies duono estas koptoj dum la alia duono estas muzulmanoj kaj animistoj, la katolika eklezio en Etiopio kompensas la nombran malmulton per la kvalito. Ok estas la ekleziaj teritorioj: 1 ĉefepiskopejo, 2 diocezoj, 3 apostolaj vikariejoj kaj 2 apostolaj prefekturoj. La regionoj, kiuj havas pli grandan nombron da katolikoj, estas la diocezo de Asmaro, kun 48.000 fideluloj, la ĉefdiocezo de ĉefurbo Adisabebo, kun 26.000 kaj la apostola vikariejo de Hararo kun 22.000. Prizorgas la kredantojn 155 diocezaj sacerdotoj kaj 314 reliĝiulinoj. Krome la eklezio direktas 200 lernejojn, kie estas instruataj preskaŭ 32.000 lernantoj. Inter la ordenoj kaj kongregacioj kiuj apostoladas en Etiopio estas la kapucenoj de la itala provinco lombarda, kiuj havas en tiu lando 78 reliĝiulojn, el kiuj 51 aŭtoktonoj kiuj laboras ĉefe en Eritreo. Al 32 francaj kapucenoj estas komisiitaj la vikariejo de Hararo kaj la prefekturoj de Hosano kaj Negelo. 23 nederlandaj lazaristoj, el kiuj 2 etiopiaj, okupiĝas pri la vikariejo de

Gimma.,dum 12 kapucenoj, inter kiuj 9 aŭtoktonaj,el la itala napola provinco, laboras en Eritreo. La kombonanoj, kiuj laboras en Etiopio estas 35, kaj ili zorgas precipe ĉe Asmaro, kie ili direktas la "Komboni" kun 1.000 lernantoj el la elementa kaj duagrada kursoj. De kvar jaroj ili okupiĝas ankaŭ pri la evangelizado en provinco de la Sidamoj, apostola prefekturo de Negelo. Ili ankaŭ malfermis en 1966a stacimision ĉe Gondar, en la ĉefdiocezo de Adisabebo, kie iliaj kvin lernejoj havas jam preskaŭ 800 lernantojn. 36 kanadaj jesuitoj instruas en la ŝtata universitato de Adisabebo kaj en "Hingh Schools". En Etiopio vivas ankaŭ 39 cistercaj monakoj, preskaŭ ĉiuj aŭtoktonaj. La fondo de ĉi tiu monakejo estis iniciata de la itala abatejo de Kasamari. De la 1960a kvin germanaj patroj de la kongregacio "Sankta Familio" direktas la malgrandan porpastran seminarion de Adisabebo, kaj tri aŭgustenanoj, ili ankaŭ germanaj, prizorgas la leprulejon de Bisidino en la regiono deHararo.

DE LA 3a DE AŬGUSTO 1960, kiam la Niĝeria teritorio fariĝis sendependa respubliko, la akordo kun la Sankta Sidejo pli kaj pli fariĝis fortika, kajperla ĵusa prezento de akredititaj leteroj flanke de la unua apostola pro-nuncio, mons. Johano Mariani, startis la normalaj diplomataj rilatoj inter respubliko de la okcidenta Afriko kaj Vatikano. Niĝerio estas vasta lando, situanta en la koro de la afrika kontinento, kies teritorio etendiĝas grandparte tra la sahara dezerto kaj havas ĉirkaŭ 4 milionojn da loĝantoj plej parte muzulmanoj. La kristana ĉeesto havas historion relative mallonga. Ĝi komenciĝis en 1931a,kiam katolika misiisto decidis labori daŭre en Niamey(la aktuala ĉefurbo de la lando), sukcesante post nurdu ja

roj inaŭguri la unuan malgrandan preĝejon. Sed favoraj kondiĉoj al evangelia mesaĝo montriĝis nur post la 1960a, t.e. post la proklamo de sendependeco. Tiel la postan jaron estis kreita la diocezo de Niamey, kies teritorio entenas la tutan landon, sub la gvidado de mons. Berlier, konsekrita episkopo samjare de papo Johano XXIII. Al la jam ekzistantaj misiejoj de Zinder, Dogondoutchi, Maradi, Dolbel, Agades, aldoniĝis novaj, de Tchirozerine, Tahoua, Bermo, Malbaza, (kie fratinoj de la "Sankta Agonio" el Mazamet sin dediĉas al porsaniga asisto) kaj ĵuse, de Makalondi, Arlit, Madawela. En Makalondi zorgas por la hospitalo la misiistaj fratinoj de Maria, dum la religiulinoj de la "Asuncio" direktas la gravan kolegion Fatima kun cento da lernantinoj; ĉe Tahoua ili direktas ankaŭ du lernejojn kaj dispensarion kaj eĉ lernejon por vaguloj, sub tendoj. En la ĉefurbo troviĝas pli gravaj katolikaj lernejoj: liceo Marima, de fratinoj de "Nia Sinjorino de la Ĉiama Asisto"; liceo Issa Beri, de la fratoj de la Kristanaj Lernejoj; kaj diversaj aliaj lernejoj. Sed lernejoj katolikaj estas starigitaj ankaŭ en dezertaj lokoj, kie troviĝas sufiĉa nombro da loĝantoj. Karakterizaĵo de la misia eklezio en Niĝerio estas la perfekta adaptiĝo al la indiĝena vivo sen privilegioj aŭ diversecoj.

PRI LA RILATOJ INTER la Hungara registaro kaj la Eklezio skribas Peter Bozsoky el Budapeŝto, informante, ke, okaze de la malfermo de la miljara datreveno de la starigo de kristanismo en tiu lando, reprezentantoj de la registaro partoprenis en solena meso. Rimarkinda evento por socialisma lando. Tio evidentigis, ke, kvankam la Hungara eklezio ne sukcesis ricevi ĉion, kion ĝi deziris, tamen la interrilatoj kun la registaro ambaŭflanke enkondukitaj, mon-

tris ke oni trovis bonan vojon. Pro tio oni rajtas esperi ankoraŭ progresojn. La jubilea jaro evolviĝis kun diskreteco. La episkoparo ne volis atendi favorajn okazojn, sed decidis moviĝi, trairi la tutan teritorion, invitante sacerdotojn kaj laikojn al la sanktejoj dediĉitaj al S.Stefano aŭ al aliaj el la dek sep hungaraj sanktuloj. Se la iamajn popolajn predikadojn, kiuj altiris imponan popolamason, oni ne povis organizi, oni ne preterlasis tamen inviti la fidelulojn al frekventado de la sakramentoj kaj al adorado de la dia eŭkaristio. Oni rimarkis kun plezuro, ke la granda porjunulara revuo "Magyar Ifjusàg" dediĉis apartan numeron al S.Stefano, "justa ŝtatestro". La iniciato altiris multajn aprobojn. La malgranda katolika gazetaro (unu monata kaj unu semajna revuoj), respektive kun 20.000 kaj 75.000 kopioj, krom unu trimonata teologia revuo) kapablis eldoni specialajn memorigajn numerojn, kun ne vasta disvastigo, kompreneble, sed laŭ libera vendo. Ne mankis opozicioj al la figuro de la unua katolika hungara reĝo Stefano, sed la katolikoj povis ankaŭ eldoni libron por lia defendo. Ni rimarkas ankaŭ, ke la ĵus pasinta jaro estis jubilea dato reveno de S. Margarita de Hungarujo (sepa jarcento post ŝia morto, kaj oni rajtas opinii, ke la jam komencita presado de la volumo "La Sklavoj de Dio", unuaranga verko de Gàrdonyi, rilatanta la delikatan kaj fortan figuron de la hungara juna sanktulino, estas frukto rezultinta de la jubilea jaro. La nova Hungarujo agnoskas, ke inter siaj gloraj figuroj bonege trovas lokon ankaŭ la humila, kaŝita, nobla reĝidino, kiu sin dediĉis al Dio por la savo de sia patrujo.

---

ABONKOTIZO: It. £.:1.000 (Us.dol. 1,60)
Poŝtĝirkonto 3-7791 al : D.ro C.C.Ferrari
aŭ pĝk al: 1-37638 - P. Giacinto Jacobitti